**Praha-ek-1970-04-01**



ZPRÁVY KLUBU ESPERANTISTŮ V PRAZE

adresa: Praha 1, Hlavní pošta, schránka 1069

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
Řeznická 17, Praha 1
(poŝtkesto 1069)

2-a numero
aprilo-majo-junio 1970

KUN NOVA KOMITATO KAJ NOVA ENTUZIASMO EK AL LABORO

La 25-an de marto okazis la jarkunveno de EKP, kiun partoprenis 55 membroj de la Klubo kaj kelkaj gastoj. La ĉeestantaro elektis novan komitaton, kiun ni prezentas al vi sur la paĝo 2. La novelektita komitato ne nur divids funkciojn, sed ankaŭ fiksis la laborplanon. Regulaj lundaj kunvenoj kaj kursoj restos plu la efektiva bazo de la laboro. Membrobazon vastigos ĉefe absolventoj de la kursoj, de kies gvido do ĉefe dependas la estonteco de la Klubo. Tiucele estas esence grava bona propagando. Ni apelacias al ĉiuj niaj membroj kaj amikoj, ke ĉiu en la jaro de Komenský klopodu altiri al la Movado almenaŭ unu novan adepton. La programo de la klubaj kunvenoj iĝis pli kvalita kaj alloga, do ni esperas, ke sekve pli multaj membroj regule vizitados nian klubejon.
- - -

! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! !

PROSBA VŠEM ČLENŮM!!!

Klub bude muset v nejbližší době opustit dosavadní klubovnu v Řeznické ulici, ve které si po adaptaci budou hladoví hosté pochutnávat na kuřatech z Xaverova.

Hledáme tedy novou klubovnu, abychom mohli pokračovat v činnosti. Měla by to být místnost pro 50 – 100 lidí, pokud možno poblíž středu města, či lehce dosažitelná. Podívejte se kolem sebe, poptejte se známých a své tipy buď zveřejněte na jednom z posledních klubových pondělků, či zatelefonujte pí Bárochové (22 98 29 7).

! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! !

**Praha-ek-1970-04-02**



Na výroční členské schůzi Klubu esperantistů v Praze 23. března 1970 byli do výboru zvoleni tito členové:

| | |
|---|---|
| předseda: | - prof. Dr. Rudolf Horský |
| výbor: | |
| místopředseda (vedení kursů) | - Antonín Slanina |
| místopředseda a programový referent | - Dolfa Bartošík |
| jednatel | - arch. Josef Drlík |
| pokladní | - Anna Bárochová |
| tiskový referent | - ing. Eduard Felix |
| knihovník | - Alois Zmeškal |
| hospodář | - Bedřich Dryák |
| zájezdový referent | - Milada Josková |
| zástupce mládeže | - Ivo Železný |
| člen | - Jaroslav Mařík |
| revizoři: | - Miroslav Damašek |
| | - Jan Molnár |
| náhradníci: | - Olga Hankeová |
| | - Marta Šmidrkalová |

Doplnění podle zápisové knihy:

Náhradníci: Hankeová (pomocník a zástupce jednatele)
Žirovnická (pomocník pokladníka)

Pomocníci knihovníka a revuisté: Marta Šmidrkalová
V. B. Kohoutek

Tisková a redakční rada: ing. Eduard Felix
Jaroslav Mařík
Oldřich Kníchal

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA sendis pere de Ĉeĥoslovaka Ruĝa Kruco ducent kronojn kolektitajn dum kunveno kiel sian guteton aldonotan al oceano de internacia helpo al la viktimoj de tertremo en Banja Luka (Jugoslavio).

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ se obrací s úpěnlivou prosbou ke všem esperantistům v Praze a Středočeském kraji.

Veškeré dosavadní pokusy o získání místnosti pro svazový sekretariát šeredně ztroskotaly. Rýsuje se možnost získat místnosti ve Francouzské ulici, které patří Osvětovému ústavu, pokud se nám podaří nalézt 1 – 2 místnosti o celkové ploše 80 – 100 m$^2$, které by Osvětový ústav mohl využít jako rozmnožovnu. Objekt může být i mimo Prahu v rámci Středočeského kraje v místě komunikačně snadno dostupném. Podmínkou je přítomnost vody (v potrubí, nikoli na zemi) a elektřiny. Ctěné návrhy laskavě zatelefonujte na číslo 25 68 92, což jest dosavadní sekretariát Svazu ve Francouzské 22, kde sedí pan tajemník Pavel Polnický.

**Praha-ek-1970-04-03**



Program v druhém čtvrtletí 1970: La Programo en la Dua Jarkvarono 1970:

DUBEN – APRILO

| | | |
|---|---|---|
| 6. | Tomáš Balda | - Esperanto a mezinárodní mírové hnutí<br>Esperanto kaj la internacia pacmovado |
| 13. | prof. D-ro R. Horský<br>Jan Nevan | - Ján Ámos Komenský<br>- UEA |
| 20. | Mir. Juřenová | - Byla jsem v Moskvě (u přílež. 100. Výročí narození V. I. Lenina)<br>Mi estis en Moskva (okaze de 100-jara datreveno de V. I. Lenin) |
| 27. | KABAREDA VESPERO | - rolas geaktoroj de la teatro de E. F. Burian<br>Consuela Morávková kaj Alfred Strejček |

KVĚTEN – MAJO

| | | |
|---|---|---|
| 4. | arch. J. Drlík | - Dvacetipětileté výročí osvobození Československa<br>Dudekkvinjara jubileo de liberigo de Ĉeĥoslovakio |
| 11. | Anna Musilová | - Houby (s diapozitivy)<br>Fungoj (kun lumbildoj) |
| 18. | Vuk Echtner | - Večer s nevidomými esperantisty<br>Vespero kun esperantistoj-blinduloj |
| 25. | Alois Zmeškal | - Stránky z esperantské literatury<br>Paĝoj el la Esperanta literaturo |

ČERVEN – JUNIO

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Bedřich Dryák | - Kvíz s diapozitivy<br>Kvizo kun lumbildoj |
| 8. | Jarmila Králová | - Zajímavosti z esperantského tisku<br>Interesaĵoj el la Esperanta-gazetaro |
| 15. | Antonín Slanina | - Synonima v esperantu<br>Sinonimoj en Esperanto |
| 22. | Dolfa Bartošík | - Před deseti lety zemřel František Omelka<br>(osobní vzpomínky a výstavka)<br>Antaŭ dek jaroj forpasis František Omelka<br>(personaj rememoroj kaj eta ekspozicio) |
| 29. | Alois Zmeškal | - Stránky z esperantské literatury<br>Paĝoj el la Esperanta literaturo |

**Praha-ek-1970-04-04**



ĜENERALA KUNVENO de la ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA, rekonante la eksterordinarajn meritojn de la karmemora honora prezidanto de la EKP, samideano Jaroslav Šustr, kaj de lia vidvino samideanino Anežka Šustrová, decidis unuanime:

1. Atribui al la Esperanto-biblioteko en Praha la nomon
„Esperanto-biblioteko de Jaroslav Šustr“
honore al tiu, kiu havas gravajn meritojn pri ĝiaj ekzisto kaj amplekso;

2. Nomi samideaninon Anežka Šustrová
honora membrino de la Esperantista Klubo en Praha
pro grava helpo, donita al la poresperanta agado de sia edzo dum lia tuta vivo.

Praha, la 23-an de marto 1970

\+ = + = + = +

POKLADNÍ ZPRÁVA

Všem členům a příznivcům našeho Klubu zasíláme další číslo našich Zpráv a těšíme se na hojnou účast na našich večerech, které se konají jako obvykle každé pondělí od 19 do 21 hod. v Klubovně (Řeznická 17).

Dnešní stav zaregistrovaných členů Klubu je 388, z nichž členské příspěvky na rok 1970 zaplatilo přibližně 240. Příspěvky ČES 1970 zaplatilo doposud asi 120 členů.

Rádi mezi sebou uvítáme další členy, případně zprostředkujeme členství v ČES. Klubovní příspěvek za rok činí pro výdělečně činné Kčs 20,--; pro rodinného příslušníka či studujícího jen Kčs 10,--.

Členský příspěvek Svazu činí:

| | |
|---|---|
| pro výdělečně činné | Kčs 48,-- |
| pro důchodce, studující apod. | Kčs 24,-- |
| rodinní příslušníci platí jen | Kčs 10,-- |

Ti, kteří se do Svazu teprve hlásí, platí ještě Kčs 10,-- zápisného za vystavení legitimace.

Všichni členové Svazu, kteří zaplatili příspěvky, již dostali legitimace. V dohledné době dostanou i nálepky na rok 1970, pokud ovšem již uhradili příslušný příspěvek.

Složenky byly přikládány k minulému číslu Zpráv. Pokud snad někomu chybí, může si ji vyžádat u pokladní Klubu (tel. 22 98 29 7).

Anna Bárochová
pokladní Klubu

\+ = + = + = +

Předseda Klubu prof. dr. R. Horský ve Velké Británii

V měsíci květnu je náš předseda hostem anglické a skotské sekce KELI a koná okružní cestu Anglií s přednáškami u příležitosti třistaletého výročí J. Á. Komenského.

**Praha-ek-1970-04-05**



SOLENA JOZEFA VESPERO

En la Esperantista Klubo en Praha, kiun la 15-an de marto aranĝis, ĉijare jam la kvaran fojon, la E-grupo ĉe Baza Naŭjara Lernejo en Mělník, fariĝis jam tradicia. La bela salono en Řeznická 17 subite kvazaŭ ekfloris dank´ al gejunuloj, feste vestitaj kaj en festa humoro, malpacience atendantaj sian prezentadon. Mi diras gejunuloj por ke ili ne ofendiĝu, sed por ni praganoj ili estas pli vere infanoj, ĉar infanoj estas tio, kio al ni mankas, al ni kaj al tuta nia movado. Sen nia salono oni malfacile daŭrigos la renkontiĝadon, sed sen junularo – la tuta movado perdus sencon.

Do, la infanoj grupiĝas laŭ aĝo kaj progresinteco kaj ĉiu grupano kontribuas al la programo per rakontado de siaj propraj personaj travivaĵoj kaj sperte dum la ekskursoj al Jugoslavio, Pollando, Francio, Svedio, Finnlando ktp. Ĉio en flua Esperanto, perfekta kaj stile kaj fonetike. Ĉu estas mirinde, ke tiuj ĉi infanoj ŝatas la lingvon, per kiu ili ekkonis en ilia frua aĝo tiom da fremdaj landoj kaj spertis tiom da romantikaj kaj enviindaj travivaĵoj?

Mi ne ŝatas bruligadon de kandeletoj al eminentuloj. Sed ĉi-kaze oni ne povas kaŝi la sorĉiston, respondecan je ĉi miraklo. Modelan pedagogon, kiu psikologie solvis la problemon, kiel allogi infanojn al Esperanto: nome anstataŭ varbi ilin, li donas al ili kondiĉojn. Kiu volas aliĝi la E-rondeton, devas esti emitenta Levanto en aliaj lernobjektoj. Infanoj volas venki malhelpojn kaj volas havi rekompencon. Rekompenco estas ĉi-kaze la aneco de la E-rondo. Kaj kiel oni vidis laŭ rakontado de la gejunuloj, ĝi ne estas senvalore.

Ni, praganoj, povis rekompenci la grandan ĝojon, kiun al ni preparis la infanoj el Mělník kaj iliaj 20 plenkreskaj amikoj, nur per sincera aplaŭdo, apenaŭ ĉesigebla.

Samideano Josef Vítek povas prave fieri pri sia sukceso, ĝi estas meritita.

Fx.

==========================================================================

EK AL BRNO!

La 24-an – 31-an de julio okazos en Brno Dua komuna kongreso de kristanaj kaj katolikaj esperantistoj. En la kadro de la kongreso efektiviĝos kelkaj interesaj prelegoj pri Jan Ámos Komensk. Loĝigo kaj manĝo estas prizorgitaj.
La kongreso estos vere internacia ĉar aliĝis jam multaj partoprenontoj ĉefe el Nederlando kaj Svedio kaj aliaj landoj. Post la kongreso estos organista ekskurso al Altaj Tatroj.

Atentigo por la membraro de EKP!

Multaj eksterlandanoj deziras antaŭ la kongreso en Brno viziti nian urbon. Ni preparas por ili du tagojn antaŭ la Kongreso ekskurson tra Praha kaj amikan renkontiĝon. Pri la gvidado tra la urbo zorgos s-anino Vybíralová. Bonvolu sinanonci tiuj, kiuj povas kunhelpi.
Aliĝilojn el la Kongreso en Brno akceptas s-ano Aleš Berka, Vsetín 1423.

**Praha-ek-1970-04-06**



LA PROGRAMO POR LA ANTAŬKONGRESAJ TAGOJ EN PRAHA
(la 22-an kaj 23-an de julio 1970)

En la stacidomo deĵoros la 21-an de julio anoj de la Klubo. La nomo de koncerna hotelo estos anoncita pli poste. (En hotelo „Michle“ la prezo por unu/dulita ĉambro faras Kčs 48,--; en hotelo „Na Vlachovce“ Kčs 34,--)

Merkredo, la 22-an de julio

Matenmanĝo proksimume je la 7.30 h., je 8.30 kunveno por la unua trarigardo de la historiaj monumentoj de Praha – kvartalo Hradčany (enirbileto Kčs 10,--).

1. Somerkasteleto de reĝino Anna (Belvedere) kun la kantáta fontano.
2. La reĝa kastelo (daŭro proks. 1.30 h)
3. Strahov – iama monaĥejo, nuntempe muzeo de ĉeĥa literaturo (belegaj salonoj kun valoraj freskobildoj)
4. por ankoraŭ ne laciĝintaj scivolemuloj vizito de la fama trezorejo Loreta.

La tuta programo daŭros proksimume 4 horojn.

Post la tagmanĝo en la hotelo Savoy oni rizpozos en la belegaj barokaj terasĝardenoj de Malgranda Urboparto. Vespere vizito de bierfarejo kaj bierejo „U Fleků“.

Ĵaŭdo, la 23-an de julio

Vekiĝoj kiel merkrede; je la 8.30 h. komencos promeno tra Malnova Urbo daŭronta proksimume kvar horojn. Oni vizitos:

1. Malnovurban placon (Malnova urbodomo kun la astronomia horloĝo), laŭdezire ankaŭ Týn-preĝejon kaj preĝejon de Sankta Nikolao aŭ Betleheman preĝejon.
2. Geton kun la plej malnova synagogo mezeŭropa.

Post transiro trans
3. la Karoloa ponto al Malgranda Urboparto ni eble vizitos la plej grandan famkonatan barokan preĝejon de Praha
4. – Sankta Nikolao. (enirbileto proksimume 10,--)

Post la tagmanĝo libera posttagmezo.

Denove por tiuj, kiuj ankoraŭ ne estos tute lacaj, estas preparita vizito de la fortikaĵoj de Vyšehrad (malnova sidejo de ĉeĥaj princoj) kun belega panoramo de la urbo. Vespere – laŭdezire – ni revidos nin en gastejo „U Kalicha“ (ĉe kaliko).

Vendredo, la 24-an de julio
Oni ekvojaĝos al Brno.

Informojn pri la programo donos la gvidantino:
Drahomíra Vybíralová, Leningradská 37, Vršovice, Praha 10, ĈEĤOSLOVAKIO

**Praha-ek-1970-04-07**



„ONU OMI ANTOJ“

- to ve správném esperantu dospělých zní: „Donu al Tomi gantojn!“ – a česky: „Dejte Tomíkovi rukavice“.

O rukavice se hlásil malý Butler. Teprve nedávno začal mluvit. Otec Angličan, maminka je Finka. Chystali se na procházku. K řádnému zevnějšku patří v Anglii nezbytné rukavice – i když jde o docela malého … občana. – Místo tří teček jsem chtěl napsat„Angličana“, ale to by nesouhlasilo, vždyť Tomík není jenom Angličan. Nemohl jsem napsat ani „Fin“ – Tomík nezná pranic ze své „mateřštiny“. A anglicky teprve začne trochu rozvazovat, až bude přicházet do styku s jinými rodinami a jejich dětmi. Tomík od malička mluví esperantsky, jak tuto řeč slyší z rozprav mezi oběma rodiči a z jejich oslovování jeho samého.

Butler starší si se slečnou Karin Koivistoinenovou nejdříve jen dopisoval. Pak se setkali na sjezdu, následovaly vzájemné návštěvy v Anglii a v zemi tisíců jezer, a nakonec založila tato dvojice rodinu. Při všem tomto vývoji se navzájem dorozumívali jen esperantem. Tímto jazykem stále hovořili nejdříve jen mezi sebou a konečně tak začali mluvit i na své děti Tomíkovi přibyla sestřička, pak bratříček – všichni esperantisté. Teprve po několika letech se přiučila maminka Karin angličtině, která nadlouho zůstala druhým jazykem v této rodině.

Byla to jedna z prvních rodin, kde zdomácnělo esperanto. Takových rodin je toho času na světě už tolik, že se vyplácí vydávat pro ně odborný časopis a svolávat mezinárodní konference.

Vuk Echtner

(z časopisu pro nevidomé Zora 3/69)

x- x - x - x - x- x - x - x - x- x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x- x - x - x - x - x - x - x - x - x - x -

JUBILEOJ

La 14-an de aprilo atingis 65 jarojn de sia vivo inĝ. Ladislav KRAJÍC el Tábor, konata funkciulo de la ĉeĥa E-movado, laboranto en maŝinfaka terminologio.

La 12-an de marto fariĜis 55-jara s-ano Adolf Staňura el Ostrava, konata pro laboruj pri E-stenografio.

REMEMOROJ

Antaŭ 90 jaroj (4. 6.) naskiĝis episkopo D-ro Antonín ELTCHKNER, esperantisto, posedanto de alta ŝtata distingo Ordeno de la Respubliko.

Antaŭ 10 jaroj (23. 6.) forpasis s-ro František Omelka, konata Esperanta verkisto.

Antaŭ 10 jaroj (2. 3.) mortis konata esperantisto, aŭtoro de lernolibro, Prof. Josef KOŽENÝ.

Antaŭ 10 jaroj (5. 4.) mortis D-ro Augustin Pitlík, iama membro de nia Klubo kaj konata E-aktivulo.

x- x - x - x - x- x - x - x - x- x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x- x - x - x - x - x - x - x - x - x - x –

VE ŠVÉDŠTINĚ vyšel před měsícem v časopisu Dagen obsáhlý článek dr. R. Horského o J. Á. Komenském. Článek vzbudil velký zájem. Autor podrobně líčí mírové návrhy Komenského a jeho návrh k vytvoření umělého mezinárodního jazyka.

**Praha-ek-1970-04-08**



Kvara volumo de

FF – AA – BB – EE – LL – OO – JJ
FF – AA – BB – EE – LL – OO – JJ
FF – AA – BB – EE – LL – OO – JJ
FF – AA – BB – EE – LL – OO – JJ

de HANS CHRISTIAN ANDERSEN

tradukitaj de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof
kun originalaj ilustraĵoj de Antoni Uniechowski
eldonitaj de HEROLDO DE ESPERANTO
240 paĝoj
24 ĉarmaj fabeloj
x- x - x - x - x- x - x - x - x

Lasta sonĝo de maljuna kverko
Filino de la marĉa reĝo
Neĝulo
Malbona princo
Aboco-libro
kaj 19 aliaj
x- x - x - x - x- x - x - x – x
La I-a volumo jam tute elĉerpiĝis
restas nur limigita kvanto da la IV-a
prezo: 45,-- po volume;
40,-- se mendita samtempe kvin ekz.

x- x - x - x - x- x - x - x - x

DENOVE EBLAS PUBLIKIGI ANONCETOJN en HEROLDO de ESPERANTO
pagante per kronoj. Anonceto ĝis 25-vorta kostas 25,--, ĝis 50-vorta 50,--, ĝis 75-vorta 75,-- ktp. ktp.
Se vi pagas samtekstan anonceton por Dufka sinsekva aperigo, ĝi estas triafoje publikigita senpage!
VIAN ANONCETON LEGOS MILOJ DA ESPERANTISTOJ EN 56 LANDOJ!

= = = = = =

Ivo Železný
poŝtkesto 7

P r a h a 56

**Praha-ek-1970-04-09**



ANTONÍN SLANINA 65-jaraĝa

Nia jubileanto fervore kaj ofereme dediĉis sian elokventan kapablon jam de sia juneco al propagando de Esperanto. Sed li ne nur propagandis, li tutan vivon instruis ĝin laŭ rekta Cseh-metodo, kiun li dum jaroj pliperektigis tiel, ke la lernantoj post absolvo de lia kurso sukcese memstare parolas kaj korespondas. Tiuj plej diligentaj eĉ mem instruis en pasintjara kurso.

Multaj esperantistoj ankoraŭ bone rememoras sukcesajn kaj ŝatatajn Esperanto-kolegiojn en Doksy kun internacia nivelo, kiuj estis ĉefe lia merito.

Post la milito li ankaŭ sukcese laboris kiel gvidanto de Esperanta elsendado de „Verda Stacio" en Praha. Li ĉiam zorgis pri kulturaj programoj kaj vere tiu stacio estis unu el la plej altnivelaj esperantistaj stacioj en la mondo. Bedaŭrinde pro politikaj kaŭzoj la elsendadoj estas ĉesigitaj en 1950. Lastatempe s-ano Slanina denove penas revivigi ĝin, bedaŭrinde ĝis nun vane. Sed ni esperu, ke samkvalitaj radio-elsendoj tamen baldaŭ efektiviĝos.

Sinjoro Slanina jam multajn jarojn pliriĉigas niajn klubajn kunvenojn per siaj gramatikaj „dekminutoj" daŭrantaj ofte eĉ duonhoron.

Ni deziras al li multajn sukcesojn en pluaj dek jaroj de lia vivo.

\+ + + + + +

JOSEF HIŽA KVINDEKJARA

La 15-an de aprilo 1970 festos sian kvindekjariĝon kaj tridekkvinjaran esperantiĝon membro de nia Klubo, s-ano Josef Hiža. Li estas fervora aktivulo en IFEF kaj ĉiam helpopreta al EKP. Ni kore gratulas!

\+ + + + + +

OTA GINZ, malnova membro de nia Klubo, dankas kore al la multnombraj geamikoj, kiuj rememoris lin per siaj leteroj, salutoj, ktp. Ili bonvolu akcepti lian pardopeton kaj klarigon, ke liaj forte neniel sufiĉas por respondi aŭ plenumi diversajn petojn, eĉ ne por nura ĝentila danko. Li estos feliĉa revidi ĉiujn en junio – julio 1970 dum iu el la klubaj kunvenoj!

========================================================================

ZPRÁVY KLUBU ESPERANTISTŮ V PRAHA INFORMOJ DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA = trimonta organo de la Klubo = redakta komitato: inĝ. Eduard Felix, Oldřich Kníchal, Jaroslav Mařík = adreso: Esperantista Klubo en Praha, poŝtkesto 1069, Praha 1, ĈEĤIO, ĈEĤOSLOVAKIO

========================================================================

ĴUS venis ankoraŭ unu grava informo, ke estas fintraktata eldono de fama progresiga lernolibro de Esperanto

William AULD – PAŜOJ AL PLENA POSEDO.

La libro estas aperonta en kunlaboro inter ĈEA kaj Heroldo de Esperanto jam ĉi-aŭtune! Antaŭvida prezo 30,--.